



Mi deziras komenci klarigante ke, kvankam mi estas iom maljuna, mi ne nostalgias al malnovaĵoj. Ĉi tiu parolado ne temas pri oldemaj manieroj. Mi klarigos tion iom poste.

Pri kio mi parolos?

- Kio estas fotografio?
- Daŭra konservo de la bildo, tiu estas la problemo
- Diĝita fotografio: teknika evoluo? alternativa arta tendenco?
- Kial fotografii analoge?
- Nigra-blanka ekzempla serio: kvartalo Usera en Madrido

Fotografio estas arto aŭ metio, kiu ebligas al ni, kapti la realon kaj fiksigi ĝin kiel bildon. La bildo ne estas la realo mem sed ĝia reprezento sur tenujo. La fizikaj trajtoj de la lumo, kiel oni ĝin kaptas, kaj la tenujo sur kiu la bildo estas fiksita, modifas tiun reprezenton. La fotisto profitas tion por ŝanĝi ĝin laŭ sia bontrovo kaj esprimi siajn sentojn. La cerbo, denaske kaj/aŭ pro kultura influo, reagas malsame al koloroj, la aranĝo de la objektoj en la spaco, kontrastoj kaj teksturoj. Kelkfoje, la fotisto volas fidele reprezenti la realon, kiel metiisto konstruas objekton, kiu estas samtempe bela kaj utila, aŭ

modifas ĝin por pli bone esprimi tion, kion li volas, same kiel artisto kreas pentraĵon aŭ komponas muzikon, kiu esprimas sentojn, moralajn ideojn aŭ simple belecon.

Fotografio pligrandigas nian memoron, kaj la simpleco per kiu oni povas nuntempe kapti bildojn pri ni mem, la homoj, kiujn ni amas, aŭ la lokoj, kiujn ni vizitas, malatentigas nin de ĝia vera valoro kiel arto. Diversaj teknikoj, ne tiel simplaj, permesas al ni akiri bildojn ne nur belajn, sed ankaŭ kortuŝajn kaj esprimplenajn. Bildoj kiuj povas komprenigi al ni problemojn kaj situaciojn, tiel ke la maniero kiel ili estas kaptitaj kaj montrataj implicas respondecon, kiel la usona eseistino Susan Sontag klarigas en ŝia verko pri fotografio "*Rigardantaj alies Doloron -- Rigarding the Pain of Others*".

Ni klarigos kiu estas la fundamento de la fotografio. Ni malkovros mire, ke la teknikoj kiuj permesas kontroli la lumon kaj kapti bildojn estas tre malnovaj, sed apenaŭ pasis 150 jaroj de kiam unuafoje oni fiksigris bildon sur la surfacon de tenujo. Tio lasta estas la baza problemo de la fotografio, por kiu oni komence trovis solvon, kiam oni malkovris, ke diversaj kemiaj substancoj reagis sub la lumo. Ĉi tiuj procezoj estis preskaŭ sensanĝe uzataj ĝis la fino de la pasinta jarcento, kiam diĝita teknologio anstataŭis ilin, ĉar ĝi havas ĉiujn avantaĝojn, kaj ŝajnis, ke ĝi restus la sola disponebla.

En lastaj tempoj aperis granda emo al ĉio malnova, kiel modo. Ne temas pri deziro lerni el la pasinteco, sed simpla nostalgio. Ekis intereso pri la vinilaj diskoj, pri la primitivaj ludoj de la unuaj personaj komputiloj, pri la meĥanikaj ludiloj de la komenco de la pasinta jarcento, kaj ankaŭ nun pri analoga fotografio.

Sed kvankam estas klare, ke vinila disko reproduktas la sonon pli malbone ĉar ĝi estas primitiva teknologio kiu altiras nur pro simpla nostalgio, la analoga tekniko en fotarto permesas malsamajn rezultojn ol tiuj de la diĝita, kaj oferas al la fotisto aldonajn esprimajn eblojn. Jen la kialo, kial fotistoj, ĉiuaĝaj, uzas ankaŭ ĉi tiun teknikon hodiaŭ. Fine, kiel ekzemplo, mi montros aron da fotoj faritaj de mi, amatora fotisto, kiuj montras iom el la altiro de tiu ĉi tekniko, kiu elstarigas la belecon de simplaj urbaj elementoj, kiuj tamen en kolora altkvalita diĝita fotado montras humilan kaj neglektitan kvartalon, sen io speciala, al kiu cetere mi estas ligita, ĉar mi vivas en ĝi de mia naskiĝo.

Kio estas fotografio?

- Temas pri teknologio kiu profitas la naturajn ecojn de la lumo, tiel ke oni povu enkadrigi, fokusigi kaj longtempe konservi bildon montrantan la realon, sed kiu ne estas la realo mem.
- La ekspondaŭron, enkadrigon kaj lokigon de la elementoj kaj ĝia koloroj decidas la fotografisto, kiu aplikas ĉiun faktoron laŭ sia propra kriterio por esprimi ion. Tial plurfoje fotografiaĵo ne estas kopio de la realo sed ties arta interpreto far fotografisto.
- Fotografio estas aro de konitaĵoj kaj lertecoj kiujn la fotografisto uzas por atingi bildon esprimantan kion li deziras, sendepende de la metodo uzata por registri ĝin.
- La ĝeneralaj fotografiaj metodoj similas sendepende ĉu la bildo estas konservata per ĥemiaj medioj aŭ digitaj. Diferencas kelkaj esprimebloj, same kiel en pentrarto inter oleo-pentraĵo kaj akvarelo.


La lumo havas antaŭvideblan koduton, sciencistoj konas precize ĝiajn trajtojn. Ĝi estas reflektata de la objektoj kaj kaptata de biologia sensoro, la okulo, kiu transigas la vid-informon al la cerbo, kapabla interpreti la tuton kiel komprenebla tridimensia sceno, en kiu eblas agi sekure.

Eblas konstrui ilojn por kapti la lumon en la sama maniero. Sufiĉas krei malgrandan truon en fermita ĉambro kaj ni povos vidi projekcion, en ĝia kontraŭa muro, de la objektoj, kiuj troviĝas fronte de ĝi.


La fotisto disponas je la manipulo de pluraj faktoroj por produkti malsimilajn rezultojn. Eblas diversaj

rezultoj ĝuste pro tio, ke ili estas interpretoj de la realo, ne ĝia fidela reprezento. Tiuj faktoroj modifas la kaptitan lumkvanton, kiel estas: la grando de la truo, ju pli granda, despli da lumo, kio, kurioze, modifas ankaŭ la longon de la zono en kiuj la objektoj estas fokusigitaj (profundeco de kampo); la tempo dum la truo estas malfermita; kaj fine la limo de la kapablo de la kaptilo atingi pli da lumo, ĝia sentiveco.

La filmoj kun alta sentiveco bezonas pli grandajn granerojn de la sentiva salo, kiuj videblas en la fina foto. Tiu efekto estas bela se taŭge uzata. La diĝitaj sensoroj bezonas pli grandan elektran potencon por kapti plian lumon, kio enkondukas bruon en la bildon, kaj malbeligas la rezulton. Grano kaj bruo ŝajnas similaj efektoj sed ne produktas la samon. Fotografistoj disponas de ĉiuj tiuj faktoroj, kies funkciaj reguloj formas la fotografian teknikon. Ili devas koni ĝin kaj trejniĝi por akiri lertecon, ne gravas ĉu temas pri analoga aŭ pri diĝita fotografio. Aldone, same kiel en pentrarto, aplikeblas ankaŭ ĝeneralaj teknikoj pri komponado kaj uzo de la koloroj, teksturoj kaj kontrasto.



La senluma kamero




Kiam la lumaj radioj trairas mallarĝan truon, ili estas inverse projekciataj en la fronta muro

La senluma kamero, kiam la lumaj radioj trairas mallarĝan truon, ili estas inverse projekciataj en la fronta muro

Daŭra konservo de la bildo, tiu estas la problemo

- Kemia reago montras negativan kaj inversigitan prezenton de la projekciigita bildo (malhelaj koloroj aperas helaj, kaj tiuj helaj, malhelaj), kaj ĝi fiksiĝas per la aldono de nova kemia substanco sur la surfaco (filmo)
- Per simila metodo oni povas projekcii la bildon pozitive sur novan porteblan surfacon (papero), kaj fiksiĝi ĝin per alia kemia reago. Tiu proceduro nomiĝas rivelado.


Aperas nova solvenda problemo. La bildo estas renversita, kaj aldone la lumigitaj areoj sur la reaktiva surfaco aperas malhelaj, kaj la nelumigitaj, brilaj. Tial ni nomas ĝin negativo. Por akiri pozitivan bildon, simila al la realo, necesas projekcii la negativon, renversigante ĝin denove sur transportebla surfaco, kiel papero. Fotografia papero reagas al kemiaĵoj kiuj rivelas la projekciitan bildon. Tial ĉi tiu procezo nomiĝas rivelado. En la sekva grafikaĵo ni povas vidi ĝin detale.



Klarigi grafikaĵon



Diĝita fotografio



La bildo estas kaptita per la registro de la lumintenso en sensoro per numeraj valoroj. Tiuj valoroj estas garditaj en diĝita dosiero. Nova prezento de la bildo okazas en ekrano per la interpreto de tiuj valoroj je matematika modelo.

En diĝita fotografio la procezo estas malsama. La lumo estas kaptita ne de filmo sed de optika sensilo. Ĉi tiu sensilo konsistas el aro de ĉeloj, kiuj estas sensivaj al la lumo, kaj kiuj registras valoron laŭ ĝia ondolongo kaj intenseco. La aro de ĉi tiuj valoroj konsistigas ciferecan reprezenton de bildo, kaj ĉiu el ili nomiĝas pikselo. Ju pli granda estas la nombro da pikseloj despli da datenoj, kio kunlabore kun kvalita optiko, ebligas atingi bone definitajn bildojn. Oni povas konservi la rezulton en dosiero storebla en disko. Ĝi povas esti kopiita, sen perdo de kvalito, tiom da fojoj kiom oni deziru, kaj oni povas ĝin

montri sur ekranoj aŭ printi en papero multfoje. La reprezento de koloro dependas de matematika modelo, aŭ kolorspaco, kaj la aparato kiu montras la bildon povas havi pli aŭ malpli grandan kapablon prezenti akurate tiun kolorspacon, kio nomiĝas dinamika gamo. Tial ni observas, ke la sama foto vidiĝas kun subtilaj kolor-diferencoj sur malsamaj ekranoj aŭ sur papero, pro kio ĉiuj aparatoj devas esti kalibritaj kune, se profesia rezulto estas postulata.

La diĝitaj sensoroj kaptas multe pli da datenoj ol ni kapablas vidi, kiujn oni storas plene, se oni uzas la ĝustan dosier-formaton. Tio ebligas modifi la bildon per specifa softvaro. Iuj nomas tion diĝita rivelado, sed mi preferas uzi la nomon postprocezo, ofte uzata en la produktado de video, ĉar ĝi ne havas ajnan similecon kun la kemia samnoma procezo. Tiu postprocezo permesas ĝustigi la lumkvanton aparte en diversaj zonoj de la bildo, tiel ke la fotisto disponas je pluraj kreativaj ebloj. Oni povas ankaŭ modifi la bildojn ekzemple por malvidebligi difektojn en la haŭto de portretitaj homoj (kion, cetere, faras ofte pentristoj) aŭ por kreativa eksperimentado. Kaj eblas ankaŭ modifi ĝin por manipuli la vidantojn, ĉefe nun, kiam artefarita inteligenteco kapablas krei realismajn bildojn. Sed tiu diskuto povas esti temo por alia prelego.

Analoga fotografio?

- Kion ni celas diri per la adjektivoj *analoga* aŭ *diĝita*? La tekniko por kapti la lumon: la ekspondaŭro, la grandeco de la obturila malfermo kaj la sentiveco de la sensoro aŭ filmo similas sendepende de la sistemo.
- Diferencas nur la metodo por la fiksigo de la bildoj, kiuj ne estas esence analoga aŭ diĝita, sed kemia aŭ elektronika.
- Surbaze de tio kial ne uzi la esprimon **kemia fotografio**?

Kiel ni jam vidis, en fotografio, oni uzas ekspondaŭron, grandon de la malfermo de la obturilo, kaj sentivecon de la sensoro aŭ filmo, kiel ĉefaj agordoj, sendepende de la metodo, kiu fiksigas la bildon. Sed, ĉu havas sencon nomumi ilin laŭ tiu lasta trajto?

Ni konsideras analoga, aparaton, kiu mezuras ion konstante, ne en sinsekvaj sendependaj momentoj, kio estas la trajto de diĝiteco. Ne utilas priskribi grandan parton de la fotografia procezo kiel diĝitan aŭ analogan surbaze de la mekanismo kiu fiksigas la lumon. Fakte, sensilo estas elektronika

kaj filmo estas kemia. Kurioze, kio estas vere
esenca estas la optika teknologio, kiun ne havas
sencon priskribi kiel diĝita aŭ analoga.

Surbaze de tio kial ne uzi la esprimon kemia fotografio?



Mi jam ŝanĝis ĝian nomon ...

Kial kemie fotografii?

- Tial ke ĝi oferas eksperimentajn alternativajn eblojn, kiuj riĉigas la artan ilaron de la fotografisto. Ĝi ne estas nun alternativo, nek antikvaĵo, sed alia stilo de la fotografia arto.
- En nigra-blanka fotografio ne necesas konverti el koloro, ĉar la filmo kaptas tiel originale la bildojn.
- En la fotografio en koloro eblas krei interesajn variantojn de la realo dank'al la specifaj kemiaj ecoj de la filmoj.
- La fotografisto sentas novan amuzon, ĉar ne eblas koni la rezulton ĝis la fino de la rivelado. Tio igas fotografii nur per antaŭa pripenso.

Ni revenu al la ĉefa temo: kial uzi la kemian teknikon? Ĝi malfacilas kaj, kiel ni vidos poste, multekostas. Temas pri alternativa stilo, kiun spertaj fotistoj esploras kiam ili jam ekspluatis la diĝitajn eblojn.

Ĝi havas kelkajn avantaĝojn. Unuaflanke eblas rekte foti nigrablanke (en la diĝita fotografio, ĉio estas kaptita kolore kaj poste estas malkolorigita). Cartier Bresson asertis, ke koloro malmankas en fotografio. Se ni ne konsideras ĉi tiun deklaron parkere, ni vidos, ke nigra-blanka fotografio reliefigas la kvalitojn de la objektoj, ĉefe kontraston

kaj teksturojn, tiel ke la grajno, kiun mi menciis antaŭe, estu alloga. Tial, se vi volas foti nigra-blanke, logikas uzi ĉefe analogajn fotilojn. Filmoj havas malsamajn kemiajn trajtojn, kiuj kaŭzas surprizigajn ŝanĝojn de la koloroj. Kelkaj el ili, kiel la filmo Ektachrome fabrikata de Kodak, produktas vivajn kolorojn, aliaj, kiel tiuj fabrikataj de Lomography, malhelajn kaj paŝtelajn. Ĉi tio povas krei interesajn efektojn, eĉ oni profitas foje ankaŭ la efektojn de eksvalidaj aŭ difektitaj filmoj. Ĝi estas ankaŭ ŝanĝon en la sinteno de la fotisto rilate sian agadon. En diĝita fotografio eblas testi tiomfoje oni bezonas, kaj vidi la rezulton tuj. Ĉi tio estas avantaĝo, sed ne ĉiam. En analoga fotografio oni devas pensi antaŭ ol pafi, ne nur por eviti erarojn, sed ankaŭ por decidi kion oni volas esprimi. Eraroj kaj manko de pripensado kostas monon.

Kiel oni povas kemia fotografii?

- Nun kemia fotografio ne estas taŭga por la ĝenerala publiko, kaj estas uzata ĉefe de artemaj profesiaj kaj amatoraj fotografistoj.
- Ĉar la uzantaro estas malgranda, ekzistas malmultaj kameraoj kaj la filmoj multekostas.
- Fabrikistoj produktas tre malmultajn modelojn de altkvalitaj kameraoj kaj ofertas plejmulte simplajn por *celi kaj pafi*.

Pro diversaj kaŭzoj analoga fotografio ne estas por ĉiuj. Unuaflanke, ĝi postulas konon kaj kapablojn. Kvankam plejmultaj fotiloj permesas neniun agordon, la fotisto devas scii kiel utiligi situaciojn, kalkulante ekspon-nivelojn senhelpe, konsiderante la eblojn de la fotilo, la sentivecon de la filmo kaj la ĉirkaŭan lumkvanton. Vi ne povas testi tuj, ĉar vi ne konas la rezulton ĝis finos la rivelado. Aliflanke, ĝi estas ŝatokupo multekosta. La prezoj de la fotiloj por celi kaj pafi estas malaltaj, sed tiuj de la filmo kaj de la rivelado, ne. Kaj ekzistas nur kelkaj laboratorioj situantaj en grandaj urboj. Fabrikistoj

faras nur simplajn fotilojn, kaj malmultajn nesimplajn, kiuj cetere estas ege multekostaj. Tio devigas nin reakiri fotilojn aĝajn pli ol tridek jaroj en la brokant-merkato, kie malfacilas trovi materialon en bona stato: lum-mezuriloj kaj mekanikaj obturatoroj kutime ne bone funkcias. Ni devas konsideri, ke ne temas pri kolektado: oni uzos efektive la fotilojn.


Filmoj kaj kameraoj



- Malnovaj kameraoj ankoraŭ funkciantaj.
- *Duonkadraj*, tiel ke oni povas kapti du sendependajn bildojn en ĉiu kadro de 35-milimetra filmo, por malmultekostigi la proceduron.
- *Lomografiaj* kameraoj, por eksportanaj eksperimentoj
- *Momentaj* kameraoj, heredantaj el la antikvaj Polaroid, kun renovigita teknologio, ĉefe por amuzo.
- Oni uzas ofte 35-milimetran aŭ 120-milimetran filmojn, kaj paperon de *momenta rivelado* Polaroid aŭ Instax.

Tiel ni trovas malsamajn tipojn de fotiloj: malnovaj en bona stato, kiuj povas esti uzataj hodiaŭ; fotiloj por celi kaj pafi, el kiuj estas tre popularaj la duonkadraj, kiuj uzas 35-milimetran filmon kaj ebligas atingi du vertikalajn bildojn en ĉiu kadro (kio malmultekostigas la filmon kaj la riveladon je duono); la tiel nomataj lomografiaj fotiloj, plejparte el plastaj kaj malmultekostaj materialoj, kiuj instigas al eksperimentado (Lomography estas aŭstria firmao, kiu repensas la dezajnon de fotiloj de la pasinta jarcento kaj produktas novajn teknologie renovigitajn, kiel Diana F+ aŭ la renovigita Lomo,

surbaze de ĉina kaj rusa modeloj respektive de la fruaj 70-aj jaroj - kvankam ĝi prezentas sin mem, kiel gvidanto de spontanea movado, miaopinie ĝi ĉefe celas monprofiton surbaze de modo; kaj fine Polaroid, kaj Instanx de Fuji, kiuj furoras je la junuloj (per ili oni atingas paperan pozitivan bildon post tuja memrivelado).



Kelkaj el la plej uzataj analogaj fotiloj



Usera estas kvartalo de Madrido, kie mi loĝas de mia naskiĝo. Ĝi ĉiam estis malriĉa kvartalo, nuntempe loĝata ĉefe de hispanamerika kaj ĉina enmigrado, iliaj hispanaj idoj jam naskitaj en la urbo, kune kun la jam tre aĝa origina loĝantaro, kies filoj plejparte iris al aliaj kvartaloj aŭ dormurboj (fakte mi estas malofta kazo).

Ĝi estas neglektita kvartalo, kun malmultaj instalaĵoj, malbona purigado kaj multaj kadukiĝintaj konstruaĵoj, kontraste kun la cetero de Madrido, moderna urbo aranĝita por turismo.

Vi povas esti trompita de tio ke la fotoj celas ĉefe

interesajn angulojn kaj konstruaĵojn. La celo de la serio estas reliefigi la enan belecon de iu ajn loko. Ĉi tiu beleco estas reliefigita plejparte danke al la sugesta blanka-nigro, kaj la grajno, karakteriza trajto de analoga fotado.

Mi devas averti, ke mi estas nur amatora fotisto; do vi ne vidos grandan kvaliton; mi esperas tamen ke vi ĝuos la montradon



Samsung fino 20S
400 ASA, aŭtomata



Domaro Moscardó estis konstruita en la kvindekaj jaroj, laŭ tipa tiutempa vilaĝstilo. En la 80-aj jaroj, konstruaĵoj estis refarbitaj kaj oni aldonis multajn sunhorloĝojn.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aütomata




Domaro "Moscardó"

Alia ejo en Domaro Moscardó



Samsung fino 20S
400 ASA, aŭtomata



Domaro Moscardó

Alia sunhorloĝo de Domaro Moscardó.




Kodak Ektar H35
400 ASA, aŭtomata



Parko Pradolongo

La parko de Pradolongo estis konstruita sur la loko kie troviĝis fabelaro de la sesdekaj jaroj.



En la parko Pradolongo troviĝas la preĝejo Maris Stella, rekonstruita kiel kultura centro.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aŭtomata



Parko Manzanares

La parko Manzanares ne troviĝas en Usera, sed ĝi estas ofte uzata de ĝiaj loĝantoj ĉar ĝi troviĝas en ĝia suda limo. Ĝi estas planita parko konstruita sub dezajno de la fama arkitekto Ricardo Bofill. La kapo, kiu kronas la monteton, tre okulfrapa, celas atentigi pri la mensaj malsanoj. Ĝi estis konstruita, kiel multaj aliaj parkoj en Madrido, sur la loko kie antaŭe troviĝis fabelaro.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aütomata



Parko Manzanares

Alia perspektivo de la monteto en la parko
Manzanares.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aŭtomata



Parko Madrid Río

La parko Madrid Río trairas la urbon sekvante la
bordon de la rivero Manzanares. Ĉi tiu estas unu el
iliaj pontoj en Usera. La figuroj sur la plafono estas
loĝantoj de la kvartalo.



Diana F+
400 ASA, 1/60, f 8



Lernejo de la Kapucenoj

La lernejo kaj preĝejo de la Kapucenoj estas konataj en la kvartalo.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aŭtomata



Preĝejo de la Kapucenoj

Fronto de la Preĝejo de la Kapucenoj.



Diana F+
400 ASA, 1/60, f 8



Avenuo de Sakta Maria de la Cabeza

Avenuo Santa María de la Cabeza estas rapida vojo kun intensa trafiko meze de la urbo, kiu dividas la kvartalon je du senkontaktaj partoj, vera urba aberacio.



Diana F+
400 ASA, 1/60, f 8



Preĝejo de Sankta Vicente de Paulo

Alia preĝejo en la kvartalo kun interesa enirejo.



Samsung tino 20S
400 ASA, aütomata



La Eliptika placo.



Kodak Ektar H35
400 ASA, automata



La metrohaltejo

La metrohaltejo.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aŭtomata



La Venuso de Usera

Dum la 90-aj jaroj, oni instigis la kreadon de murpentraĵoj sur la fasadoj de konstruaĵoj. Ĉi tiu, de kubisma stilo nomiĝas La Venuso de Usera.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aütomata



La Kuir-roboto

Alia murpentraĵo: La Kuir-roboto.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aŭtomata



La falo

La Falo, unu el la murpentraĵoj plej konataj.



Samsung fino 20S
400 ASA, aŭtomata



Inside Usera, ene de Usera, estas la murpentraĵo plej konata kaj samtempe la plej malbone konservata. Ne ekzistas ajna kialo, ke oni nomumis ĝin originale en la angla.



Samsung fino 20S
400 ASA, aŭtomata



Jen la konstruaĵo plej moderna de la kvartalo, la
urba publika biblioteko.



Samsung fino 20S
400 ASA, aŭtomata



Alia perspektivo de tiu konstruaĵo.



Kodak Ektar H35
400 ASA, aütomata



Kvartala urbodomo

Kaj jen alia...



Samsung fino 20S
400 ASA, automata



La parko de la Sudo estas la plej antikva de la kvartalo.



Samsung fino 20S
400 ASA, aŭtomata



Alia perspektivo de la parko de la Sudo.



Samsung fino 20S
400 ASA, aŭtomata



La laketo de la parko de la Sudo



Kodak Ektar H35
400 ASA, automata



Parko Olof Palme

Rekuperita angulo, la parketo Olof Palme,



Samsung fino 20S
400 ASA, automata



La ĉefa strato de la kvartalo, Marcelo Usera.



Dankon!

Miguel A. Sancho

masanpar@gmail.com

<https://sites.google.com/view/masanfot>

Ni atingis la finon de la parolado, mi esperas, ke ĝi estis amuza kaj de via intereso. En la retadeso kiun vi povas vidi, vi trovos pliajn miajn fotojn, se vi ŝatis, kion mi montris al vi.